

Uvodnik

Frontartikolo

Preteklo zelo vroče poletje ni bilo prazno. Čeprav je vreme zahtevalo svoj davek v utrujenosti in iskanju primernih pogojev za delo, je tudi 111. svetovni esperantski kongres v Gradcu z vidno udeležbo slovenskih (ge)esperantistov potrdil sposobnost preživetja našega gibanja. Zaradi bliskovitega tehnološkega razvoja, napredujoče podnebne krize ter nerešenih družbenih razmer vsepovsod na svetu seveda ostajajo neodgovorjena številna vprašanja o prihodnosti esperanta kot jezika in kot ideologije. Vsekakor ne bo »miru med oljkami«, ampak bo potrebno aktivno iskanje zadovoljivih rešitev za uveljavitev esperanta kot praktičnega in pravičnega orodja za mednarodne in medčloveške odnose. **Urednik**

La pasinta varmega somero ne estis malplena. Kvankam la vetero lacigis kaj postulis serĉi taŭgajn laborkondiĉojn, ankaŭ la 111-a UK en Graco, kun rimarkebla partopreno de slovenaj (ge)esperantistoj, konfirmis la daŭripovon de nia movado. Kompreneble, pro la rapida teknologia evoluo, la antaŭeniĝanta klimata krizo kaj nesolvitaj sociaj problemoj tra la tuta mondo, multaj demandoj pri la estonteco de Esperanto kiel lingvo kaj kiel ideologio restas neresponditaj. Certe ne estos "paco inter la olivarboj", sed estos necesa aktiva serĉado de kontentigaj solvoj por establi Esperanton kiel praktikan kaj justan ilon por internaciaj kaj interhomaj rilatoj. **Redaktoro**

Iz dejavnosti ZES

El la agado de SIEL



ZDRUŽENJE ZA ESPERANTO SLOVENIJE • SLOVENIA ESPERANTO-LIGO

Festo de la Monda tago de Esperanto



Ĉi-jare, SIEL honoris la Mondan tagon de Esperanto la 26-an de julio per kleriga ekskurso al Vrhnika, la naskiĝloko de la verkisto Ivan Cankar. Ni invitis ĉiujn slovenajn geesperantistojn kaj amikojn de Esperanto, kaj ankaŭ gastojn el eksterlando. Sunan dimanĉon, 20 el ni kolektiĝis en la kafejo de la Hotelo Mantova meze de Vrhnika kaj baldaŭ aliĝis al ni loka gvidistino.



La »lernejo« sur la bordo de la rivero Ljubljanica (ŝola pod mostom) (Foto Skribas)

Post duonhora gvidata rondiro tra la urbo, kie Cankar pasigis sian fruan junecon en granda malriĉeco, ni eniris la memordomon kun la muzeo de la granda verkisto. Post la prelego de la gvidistino, ni aldonis nian propran kulturen programon: Dragica Ropret Žumer legis eliraĵon el la traduko de Ošlak de la romano *Na klancu* (Surdeklive), kiun SIEL preparas por publikigo ĉi-jare, kaj Ostoj Kristan donis en ambaŭ lingvoj superrigardon pri tradukoj de la verkoj de Cankar en Esperanton. Fine de la vizito al la memordomo, ni faris grupan foton antaŭ la enirejo.



La gasto el Kanado Normand Fleury, Dragica Ropret Žumer kaj Peter Grbec (Foto Skribas)



El nia biblioteko: *Esperanto-Praktiko*, Berlino en la jaro 1929 publikigis la unuan esperantigon de Cankar: *La servisto Jernej kaj lia rajto* (Foto Skribas)



Bedaŭrinde ni ne havis gladilon por plibeligi la flagon (Foto Skribas)

Poste oni translokiĝis al la plenega gastejo *Boter* kaj tagmanĝis. Tie ni ne nur kontentigis niajn fizikajn bezonojn, sed ankaŭ prezentis du novajn publikigojn en Esperanto: la *Arĉ-instrumentan terminaron* de Zoran Hudales kaj la korean-esperantan version de la slovena bildlibro *Alma – Mondo antaŭ la hejma sojlo* (pli pri ĉi tiuj publikaĵoj en apartaj artikoloj). **O.K.**

Obiski tujih esperantistov

Zaradi bližine letošnjega svetovnega kongresa UEA je bilo letos poleti pri nas več obiskov esperantistov iz daljnih dežel. O obiskih v Mariboru pogledajte v rubriko *Iz dejavnosti EDM*.

Kanadčan Normand Fleury je po Mariboru obiskal tudi Ljubljano. Kot ornitolog je v jutranjih urah opazoval ptice v mestnih parkih, seveda pa je šel tudi na presihajoče Cerkniško jezero, kjer je naravni rezervat svetovnega pomena. S svojim amaterskim znanjem sem mu predstavil zgodovino in arhitekturo Ljubljane, dalje pa sva se zadržala v klubskih prostorih ZES. Poleg knjižnice in arhiva ga je zanimala organiziranost našega esperantskega gibanja ter njegova zgodovina. Sam je namreč funkcionar quebeške esperantske zveze in se med drugim ukvarja z jezikovno enakopravnostjo v Kanadi. Z veseljem se je tudi pridružil naši proslavi Dneva esperanta na Vrhniki.

Indonezijka Ilia Sumilfia Dewi iz Djakarte je bila po Svetovnem kongresu tudi v Izoli in Piranu, kjer so jo spremljali in vodili člani Obalne sekcije. **O.K.**



Placo Tartini en Pirano: Zoran, Irena, Ilia, Marja, Peter kaj Lunjo

Nova izvirna esperantska knjiga

Zoran Hudaes, membro de la marborda sekcio de SIEL, verkis kaj eldonis originalan esperantantlingvan *Arĉ-instrumentan terminaron*. La 48-paĝa libro en la formato A4 estas riĉe ilustrita per koloraj fotoj. Temas pri grava muzikfaka literaturo. Se vi deziras kopion de la terminaro, bonvolu adresi vin retpoŝte al la aŭtoro (rogstiri@gmail.com).



Obalna sekcija ZES, ki se že več let pod mentorstvom Petra Grbca sestaja v Izoli, je aktivna na zelo različne načine. Redno izboljšujejo znanja jezika, opravljajo izpite, prirejšajo vidne dogodke, objavljajo ĉlanke, udeleĵuĵejo se prireditĵev doma in v tujini. Tokrat je nĵihov ĉlan Zoran Hudaes v samozaloĵbi izdal izvirno esperantsko strokovno knĵigo – *Arĉ-instrumenta terminaro* (Pojmovnik izrazov za godala). Knĵiga v esperantu obseĵa 48 strani formata A4 z mnogimi barvnimi slikami na kakovostnem papirĵu. Izŝla je v omeĵeni prvi nakladi, a je ŝe opaĵena in ŝranĵena v strokovnih knĵiĵnicah, seveda tudi naŝi.

Kot nekdanĵi poklicni glasbenik in dolgoletni ljubitelĵski pomoĉnik v Goslarstvu Demŝar je Zoran opazil pomanĵkanĵe esperantskih strokovnih izrazov na tem podroĉĵu. Zakopal se je v raziskovanĵe, preverĵal razne esperantske slovarĵe in poĵmovnike, se posvetoval s slovaropisci ter nazadnĵe oblikoval bogat poĵmovnik za to sicer ozko strokovno podroĉĵe, ki pa ima zaradi visoke, svetovno priznane kakovosti Demŝarĵevih godal, velik pomen za slovensko kulturno in gospodarsko ĵivljenĵe.

O svoĵem delu za ta poĵmovnik, sam ga imenuĵe Terminaro z veliko zaĉetnico, in o nadalĵnjih naĉrtih je Zoran Hudaes povedal:

Terminaro sem izdal v 50 izvodih. Pojavlĵa se tudi ŝe razmislek o dotisku ali celo novi, dopolnĵeni izdaji Terminara. Sedaj je nekaj izvodov ŝe na razpolago pri meni s plaĉilom prostovolĵnega prispevka.

Izvod Terminara ima tudi mag. Bernhard Tuidĵer z Oddelka za planske jezike Avstrijske nacionalne biblioteke na Dunaju. Poleg tega sem izroĉil en izvod knĵige gospe Ruth Kevess-Cohen, sourednici nastajajoĉe nove izdaje esperantskeĵa ilustriranega slovarĵa PIV, ki ga je z veselĵem spreĵela. Na svetovnem kongresa UEA v Gradcu sem s posredovanĵem predseĵdnika Britanske esperantske zveĵe priŝel do stika z g. Andrewom Marshallom. G. Marshall ŝe dolgo sestavlĵa obseĵen slovar glasbenih izrazov v esperantu. Poslal sem mu svoj Terminaro in imela sva tudi pogovor okrog nekaterih besed.

Lĵepo bi bilo, da bi tudi drugi slovenski esperantisti Terminaro prebrali in podali svoje pripombe. Najbolĵ bi bil vesel, ĉe bi se vsaj nekaj besed znaŝlo tudi v spletnem slovensko-esperantskem slovarĵu, za katereĵa skrĵbi mag. Jug.

Terminaro je nastajal v tesnem sodelovanju z mojim učiteljem esperanta Petrom Grbcem. Brez njega ne bi pripeljal stvari do konca. Dobivala sva se na nešteti sestanekih in neumno iskala primerne izraze. Pri tem moram omeniti tudi »sošolca« Denisa Mariona. Vendar je glavnina dela potekala s Petrom. Čeprav je Peter na dele razstavljeno violino in posebno goslarско orodje videl prvič, je bil pri esperantskem besedotvorju neverjetno hiter in ustvarjalen: mimogrede je »izumil« besedi *anim-enmetilo* in *anim-eltirilo*.

Zoran Hudales je o svoji knjigi spregovoril tudi 12. avgusta 2026 na Radiu Koper v oddaji *Dopoldan in pol*. V 11 minutnem intervjuju z naslovom *Godala in glasba so dobila knjigo v esperantu* je odgovarjal na vprašanja novinarki Nataše Benčič, ne le o svoji knjigi, ampak tudi na druga vprašanja o esperantu in o aktivnosti Obalne sekcije v Izoli. Zanimivi razgovor lahko poslušate s to [povezavo](#).

Zahvala in čestitke avtorju in sotrudnikom pri izdaji *Pojmovnika izrazov za godala*, saj so povečali odtis Slovenije v Esperantuji. **O.K.**

Prijava za knjižnično podporo Bachrich

Pri UEA obstaja od leta 2014 sklad *Knjižnična podpora Bachrich*, ki vsako leto pomaga izbranim esperantskim knjižnicam z materialno podporo v obliki brezplačnih knjig iz ponudbe kataloga UEA. Več o tem skladu in razpisu podpor za leto 2026 si lahko preberete s povezavo na *Gazetaraj komunikoj de UEA* z dne [20. 5. 2026](#).

Letos se je ZES prvič prijavilo na razpis, ki je bil odprt do 20. avgusta. Na seznam željenih knjig smo dali 11 naslovov knjig iz kataloga UEA, ki jih še nimamo in ki izpolnjujejo kriterije naše knjižnice, to pomeni, da so povezane z esperantskim gibanjem v Sloveniji ali pa jih potrebujemo za svoj razvoj.

Prosili smo za naslednje knjige, nekatere v več izvodih:

La domo de Maria helpantino,
Kolektanto de ĉielarkoj,
La malbela jaro,
Probable troviĝas neniue ateisto,
Idento kaj komunikado,
Duobla spiralo,
Eŭropa ideologio,
Eŭropo, vi baldaŭ mortos!,
Interkultura dialogo kaj komunikado,
Internacia familio – utopio aŭ realaĵo in
Vojaĝo de Onia – Eŭropa.

Po elektronski pošti smo bili 11. septembra obveščeni, da je vodstvo UEA našo prošnjo odobrilo ter izdalo ustrezen nalog za Libroservo UEA. Torej se lahko veselimo skorajšnje pošiljke, ki bo obogatila našo knjižnico. **O.K.**


Iz dejavnosti EDL

El la agado de ESL



ESPERANTSKO DRUŠTVO LJUBLJANA
ESPERANTO-SOCIETO LJUBLJANA

Korea kaj Esperanta bildlibro pri Alma



Pakaĵo kun 10 ekzempleroj de la dulingva Korea-Esperanta versio de la bildlibro *Alma – La Mondo antaŭ la hejma sojlo* alvenis al Ljubljano meze de julio. ESL devis pagi doganimposton kaj finfine ni povis teni la librojn en la manoj. La aŭtorinoj kaj la eldonistoj de la slovena tute esperanta eldono tiel ricevis pruvekzemplerojn. Ni konsentis, ke la ekzempleroj disdiviĝos po du al la verkistino Mojiceja Bonte, la ilustristino Polona Kosec kaj la Nacia Universitata Biblioteko, po unu al la tradukintino Nika Rožej, la Centra biblioteko de Celje, la Biblioteko de SIEL kaj la Planlingva Kolekto kaj Esperantomuzeo en Vieno.

La plej freŝa novaĵo estas, ke la Seula eldonejo Azalea meze de septembro publikigis ankaŭ la tute korean version de la libro, kiu havas iomete ŝanĝitan titolon en la korea lingvo: *Alma ekiras al la mondvojaĝo*. La bildo montras la korean tradukiston kaj iniciatinton de la publikigo de ambaŭ libroj, sinjoron Jang Jeong Ryeol – Ombro. La dua pakaĵo kun 10 pruvekzempleroj jam bone alvenis al Ljubljano. **O.K.**





Vodenje po Mariboru

Ankaŭ somere esperantistoj kiel kutime vagadas tra la mondo. Kaj kiel kutime ili volonte vizitas »lingvajn parencojn«.

Tiel en majo nin vizitis Yanouk Jenovk el Germanujo, kaj en julio Normand Fleury el Kanado. Ambaŭ vizitantojn gvidis tra la urbo nia profesia turisma gvidanto Janko Štruc. Kaj interese estis paroli pri iliaj spertoj kaj aparte hobiaj interesoj. Nome Yanouk serĉis interesajn malnovajn lokojn, kie povus ekzisti fantomoj. En nia regiono, konata laŭ la vindrinkado, ili vere oftas. Sed nia vizitanto Normand havis kiel hobion ekkonon de niaj birdoj, kaj dum sia restado kolektis preskaŭ kvindek diversajn fotojn de birdoj en nia ĉirkaŭaĵo.

Cetere Normand estas edzo de Zdravka Metz el Varaŝdin. Ili vivas proksime de Montrealo. Ili ambaŭ apartenas al la plej aktivaj esperantistoj en Kebeko en Kanado. Zdravka apartenas al iama junulara grupo el diversaj kunlaborantaj urboj kun Maribor. Tial Normand estis kelkajn tagojn familia gasto de Ana kaj Janez Zdravec. **J.Z.** **Fonto:** <https://esperanto-maribor.si/poletni-obiski-someraj-vizitoj/>



Janez Zdravec, Ana Ferrer Zdravec, Normand Fleury, Maja Kovačič in Janko Štruc

Kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Graz, la merkredo la 5-a de aŭgusto estis rezervita por ekskursoj. Mi havis la honoron montri al kvin esperantistoj kelkajn vidindaĵojn de Mariboro. Ili estis Rob Ebenau, Heidi Goes kaj Eriko Nemes el Belgio, Sondag Ilia Sumilfia Dewi el Indonezio, kaj Abel Massiala el Angolo. Ĉiuj vizitis Slovenujon unuafoje kaj, malgraŭ la varmega vetero, ĝuis la viziton kaj atente aŭskultis la klarigojn. Post la gvidado sekvis agrabla kunestado ĉe trinkaĵoj.

Estas interese menci, ke Heidi Goes jam respondis al nia invito en 2017. En la somera numero de nia revuo *Espero* (2017, p. 29–31) ni publikigis ŝian artikolon pri la lernado de Esperanto en Orienta Timoro. La artikolo estas legebla ankaŭ ĉi tie: <http://esperanto-maribor.si/wp-content/uploads/2015/07/Espero-2017-08.pdf>.

Ankaŭ Sondag Ilia Sumilfia Dewi kontribuis al nia revuo *Espero*. En la somera numero de 2016 (p. 21–23) ŝi publikigis artikolon pri sukcesa kongreso de esperantistoj el tri landoj en Indonezio. La artikolo estas legebla ankaŭ ĉi tie: <http://esperanto-maribor.si/wp-content/uploads/2015/07/Espero-somero-2016.pdf>. J.Š. (Fonto: <https://esperanto-maribor.si/esperantisti-na-obisku-v-mariboru/>)



Kelkaj kongresanoj el Graz dum la vizito al Mariboro

Inter slovenaj esperantistoj ni havas tri rajtigatajn turismajn gvidistojn, krom Janko Štruc okaze funkcias Jerneja Jezernik kaj Gregor Markič. Naskiĝas la ideo, ke ili povus inspiri iun alian profesion turisman gvidiston lerni Esperanton kaj pliigi la eblon de gvidado en Esperanto. Estas ankaŭ relative malmultekoste riĉigi la oferton de turismaj broŝuroj en Esperanto, precipe per eldonado de Esperantaj versioj de ekzistantaj turismaj materialoj aŭ materialoj en preparado. Nia "turisma sekcio" certe trovos kaj realigus aliajn ideojn, eĉ profitodonajn.

Esperantisti na dnevnu sodelovanja Interreg 2026

Predvsem mariborski esperantisti so se 12. septembra udeležili druženja in pohoda v počastitev medregionalnega sodelovanja v Zahomcu / Achomitz in v Bistrici ob Zilji / Feistritz an der Gail na avstrijskem koroškem. Širši članek v slovenščini s slikami dobite na spletišču EDM, povezava <https://esperanto-maribor.si/esperantisti-na-dnevnu-sodelovanja-interreg/>.

Plia prezento de la bildlibro en Izola



Ĉe la Urba Biblioteko de Izola, strato Osvobodilne fronte 15, Esperanto-Societo Maribor prezentos la internacian lingvon Esperanto kaj sian paron da bildlibroj *Fabeletoj por formiketoj* / *Pravljice za mravljice* lundon, la 19-an de oktobro je la 18-a horo. Al la evento partoprenos ankaŭ fama verkisto Tone Partljič, kiu ĉiam havas ion interesan por diri. Tiu kunveno ankaŭ estos ŝanco por esperanto-parolantoj el la marborda regiono prezenti sin al la rondo de homoj, kiuj kutime ĉeestas eventojn en la biblioteko. Pli pri la evento en la slovena aŭ en la itala lingvo oni povas legi per la [ligilo](#). **M.V.**

Komentiramo

Ni komentas

Potreba po sekciji učiteljev esperanta

Inter slovenaj geesperantistoj estas pluraj kapablaj instruistoj de Esperanto. Ilia laboro bezonas esti kunordigita por pli granda efikeco. Tial necesas lanĉi sekcion de instruistoj de Esperanto. Krom profesiaj taskoj, ĝia ĉefa zorgo estos politika laboro por la enkonduko de Esperanto en bazlernejojn (instruplano MLA) kaj por la enkonduko de Esperanto kiel laborlingvo en EU.

Pred mnogimi leti je bila Slovenija v esperantskem svetu znana po številni in ustvarjalni skupini učiteljev esperanta. Vodili so mnogo teĉajev na raznih ravneh in ustvarjali ustrezne uĉbenike. Naj omenim izmed njih vsaj Rudolfa Rakušo, Sonjo Tavĉar in Antona Logarja.

Tudi zdaj je med nami mnogo kvalificiranih (ge)esperantistov, ki poklicno ali amatersko pouĉuĵejo mladino ali odrasle, delno predmet esperanto, delno druge z esperantom povezone predmete. Mislim na dr. Marijo Zlatnar Moe, dr. Simono Klemenĉiĉ, mag. Janeza Juga, Petra Grbca, Gregorja Markiĉa, Thomasa Kobilŝka, Janka Ŝtruca, Dragico Ropret Ŝumer, Marjano Komprej in ŝe kopico amaterskih uĉiteljev, med njimi tudi sebe. Uĉinek vseh teh kadrov pa je daleĉ od moŝnega, ker niso povezani in nimajo skupno sprejetih ciljev. Iz te ugotovitve sledi sklep, da v ZES nujno potrebujemo sekcijo uĉiteljev esperanta, ki bo vsklajevala delo na tem podroĉju.

Kaj bi se dalo postoriti in kaj je moŝno v danih razmerah uresniĉiti, je stvar strokovne razprave v okviru sekcije. Drznem si navreĉi nekaj t  m: spletni teĉaji za odrasle, testiranje uĉnega naĉrta MLA v nekaj ŝolah, poziv pristojnemu ministru, vladi in politiĉnim strankam za

uvedbo MLA v 3. razred osnovne šole, tečaji esperanta za posebne poklicne skupine kot na primer turistične vodnike, jezikoslovce, novinarje, policiste itd.

Učbenike, slovarje, čitanke in drugo gradivo imamo na razpolago v slovenščini in v drugih jezikih, močno brezplačno podporo pa nudita tudi spletišči lernu.net in edukado.net. Problem na splošno ni učno gradivo, celo (prostovoljnih) učiteljev ne manjka. Manjka pa interesa in vzpodbude. To pa lahko zagotovi predvsem izobraževalni sistem in politika. Zato bi morala biti osnovna naloga nas vseh, zlasti pa učiteljev esperanta, biti vztrajno aktiven pri zahtevah EEU, da se uvede esperanto kot delovni jezik v Evropski uniji ter osnove esperanta kot prvi tuji jezik v osnovnih šolah.

Če ne bomo ukrepali in bomo odlagali umske napore in družbene bitke na kasnejše čase, bomo esperantisti postopno zaradi bolezni in starosti izumrli brez naslednikov, vse nas bo povozila tehnologija s prevajalniki in drugimi algoritemskimi orodji. Če bomo imeli veliko srečo, bo esperanto kot delovni jezik uvedla skupina BRICS. Tedaj se bo morda arogantni Zahod vseeno potrudil uporabiti genialni evropski izum dr. L. L. Zamenhofa. **O.K.**

Obvestila in vabila

Informoj kaj invitoj

Karstaj tagoj 2026



KARSTAJ TAGOJ
TRIESTO,
25. - 27. 9. 2026

Karstaj tagoj 2026 estis unu el la eventoj kadre de la festado de la 120-a naskiĝdatreveno de Triesta Esperanto-Asocio (TEA). Per tiu internacia kaj interregiona evento ni ankaŭ festis la *Eŭropan tagon de lingvoj*. La tritaga kunveno okazadis en Triesto kaj ĝia ĉirkaŭaĵo de la 25-a ĝis la 27-a de septembro 2026. La organizantoj estis TEA kaj la sekcio de SIEL *Marbordo* el Izola. Oni povis aliĝi kaj informiĝi en la retejoj <https://karstajtagoj.wordpress.com/> kaj <https://eventaservo.org/e/6847c2>.

La interkona vespero en la ejoj
de TEA (Foto O. K.)



Partoprenis pli ol 30 personoj el sep landoj, plejparte el Slovenujo (16) kaj Italujo (10). La belega vetero de la malfrua somero sen boreo multe helpis ĝui la ŝipveturon, la promenadojn kaj panoramojn. Do la planita programo estis en sia tuto plenumita danke al la ĉefaj organizantoj Edvige, Elda, Peter kaj Roberto.

Dum la interkona vespero post la laciga travido de la urbeto Muggia / Milje, la reprezentanto de SIEL donacis al la biblioteko de TEA du novajn eldonaĵojn: la originan esperantan romanon de Vinko Ošlak *Patron serĉinta, de Filo trovita* kaj la duligvan Esperantan kaj slovenan bildlibron *Tritiko, la plej bela floro*, verkita de Dragica Ropret Žumer.



Parto de la ĉeestantoj ĉe la Ŝtonaj turegoj (Torriani di Monrupino / Repentaberske stene)

Pliajn raportojn kaj multajn bildojn oni povas trovi en la [retejo de EDM](#) kaj en la [paĝo de Lunjo](#) Leŝnik. O.K.

Raporto pri la 111-a UK GRAZ 2026



Rimarkinda estis la partopreno de slovenaj esperantistoj ĉe la 111-a Universala Kongreso de Esperanto en Graz, la ĉefurbo de la aŭstra regiono Stirio. 14 homoj registriĝis kaj pagis siajn kotizojn, sed tri el ili ne ĉeestis la kongreson pro sanproblemoj. Tamen, Luĉka Leŝnik estis virtuale konstante kun ni kaj afiŝis interesajn faktojn kaj bildojn el la kongreso. Por ke la slovena Karintio ne restu sen reprezentanto pro la malsano de Davorin Juraĉ, Vinko Ošlak transprenis la prezentadon de Celovec / Klagenfurt kaj de la ĉirkaŭa regiono por la slovenaj partoprenantoj de la koncerna kongresa vojaĝo. Nia esperantisto Janko Ŝtruc profesie prizorgis la partoprenantojn de la kongresa vojaĝo al

Mariboro (vidu la artikolon en la retejo de EDM per la ligilo <https://esperanto-maribor.si/esperantisti-na-obisku-v-mariboru/>). Ankaŭ vizitis nian Stirion la estro de la sciencaj prelegoj ĉe la kongreso, Amri Wandel, israela profesoro pri fiziko kaj astronomo, kiu poste afiŝis siajn bildojn de la vinvojo antaŭ la gastejo Jeruzalem.



Marjana Komprej kaj mi prezentis Slovenujon ĉe la *Movada Foiro* en la unua tago. En la mallarĝa spaco de duono de la stando inter la bulgaroj kaj la ĉeĥoj, ni ekspoziciis niajn librojn, bultenon, poŝtmarkojn kaj etan slovenan flagon, kaj krom informoj ni distribuis la turisman broŝuron *Malkovru Ljubljanon* kaj vizitkartojn de SIEL. Ni eĉ vendis kelkajn poŝtmarkojn kaj unu libron, kaj fordonis tri librojn. Ne mankis intereso pri nia agado, sed bedaŭrinde, pro la grandaj homamasoj, multaj homoj ne atingis la standon.



La tumulto de la Movada foiro (Foto O. K.)

Ekde dimanĉo, la 2-a de aŭgusto, okazis granda nombro da eventoj dum la tuta tago, foje eĉ ok samtempe. Eventojn oni devis elekti surbaze de la neceso de partopreno kaj ilia intereseo. Mi kiel amatora edukisto kaj Marjana, profesiulo en ĉi tiu kampo, ni fiksas al ni la celon partopreni la paroligajn kursojn por progresintoj kaj komencantoj, ĉar ilin gvidis elstaraj instruistoj Sylvain Lalarge kaj Katalin Kováts. Tiel ni akiris nian parolan sperton kaj scion pri gvidado de kursoj.



Katalin Kováts vige gestadis (Foto O. K.)

Kvankam mi volis ĉeesti multajn prelegojn de la scienca sekcio de UEA (AIS, IKU, Scienca kafejo kaj Esperantologia Konferenco), mi devis prioritigi prezentojn de organizaĵoj kiel IKEF, IFEF, EDE-EEU-Eŭropa Komisiono de UEA, ELF-AREK kaj la instancoj de UEA. Nia komitatano Peter Grbec, kompreneble, ĉeestis ambaŭ kunvenojn de la Komitato de UEA kaj ĝian forumon, kaj ankaŭ la prezenton de la Akademio de Esperanto. Ni simple ne povis kovri ĉiujn gravajn eventojn, ĉar ni ne planis la partoprenon de la aliaj, finfine ja ĉiu pagis la kongreson el sia propra poŝo.



Peter kaj mi ankaŭ kontribuis al la laboro de la Komitato kaj de la estraro de UEA. Peter prezentis proponon por ŝanĝoj al la regularo pri organizado de kongresoj kun la celo allogi pli da junuloj (ĝis 35-jaraj) kaj precipe studentojn. Mia demando al la estraro de UEA koncernis la strategion por enkonduki Esperanton en la 1-an triopon da klasoj en elementaj lernejoj uzante la programaron MLA. Mia demando en la forumo *UEA respondas* estis konsiderata tre grava de prezidanto Maia. Vicprezidanto O'Riain respondis, ke praktikaj testoj de la MLA-metodaro estas preparataj. Mi povas nur esperi, ke la Eduka Komisiono (Arko) kaj la Komisiono por Eŭropo (O'Riain) serioze traktos ĉi tiun aferon.

Iom neatendite, nia brita membro Rikardo Smith aperis sur la scenejo de la granda koncertejo de la Kongresa Palaco Graz kadre de la internacia kultura vespero. Li sola akompanis la Grandan Miksitán Ĥoron de UEA per gitaro dum ili prezentis komponaĵon destinitan por la venonta kongreso en Aŭstralio.



La kongresa koncertejo kaj la miksitaj ĥoro de UEA (Foto O.K.)

Deviga parto de ĉiu UK estas la *Libroservo*. Homoj emas aĉeti nur iomete, ĉar la prezoj de la ofertitaj libroj ne estas la plej malaltaj. En la vasta gamo da produktoj, mi rimarkis nian *Esperantan-Slovenan Vortaron* kaj la librojn de Ošlak *Fido* kaj *Epistolo al Philémonos*. Tamen, mankis al mi *Alma* kaj *La kroniko de Visoko*, kiuj certe apartenus ĉi tien. Ĉu ili jam estas elĉerpitaj? Rilate al tio, oni esprimis zorgojn en unu el la forumoj pri la disiĝo de la UEA-Libroservo kaj la Biblioteko Hector Hodler. Nun ne estas klare, kien kaj en kiomaj kvantoj eldonistoj de esperanta literaturo povas vendi aŭ donaci ekzemplerojn de siaj eldonoj.

Ankaŭ indas mencii, ke mi persone invitis la estrojn de esperantaj bibliotekoj, muzeoj kaj arĥivoj Bernhard Tuidar (ÖNB, Vieno) kaj Josip Pleadin (DEC, Djurdjevac), viziti Ljubljanon kaj niajn societajn instalaĵojn. Ili certe trovos ion interesan por interŝanĝi aŭ aĉeti en niaj kolektoj.

Nome de SIEL, mi gratulis la prezidanton de LKK, Ewald Schick, pro la bonega organizado de la kongreso kaj pro lia persona sukceso kolekti ĉirkaŭ si grandan junan teamon de kunlaborantoj kaj volontuloj.

Ĉi tiu protokolo ne estas oficiala raporto kaj mi volonte kompletigos ĝin per observoj kaj raportoj de aliaj kongrespартoprenintoj el Slovenujo. **O.K.**

Rezolucio de la 111-a Universala Kongreso de Esperanto en Graz

Universala Kongreso
de
Esperanto



Graz 2026

La 111-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazinta en Graco (Graz), Aŭstrio, kun 1138 aliĝintoj el 62 landoj kaj teritorioj, traktis la temon **Volontulado en la servo al daŭripova evoluigo** kadre de la Internacia Jaro de Volontuloj por Daŭripova Evoluigo, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj (UN). La UK mem, kiu okazas ĉiujare, estas konkreta ekzemplo de internacia volontula kunlaboro: ĝi ebligas danke al la sindona laboro de multaj volontuloj el diversaj landoj.

Volontulado kiel forto de la Esperanto-movado

La Esperanto-movado ekde sia komenco vivas per diversfona volontula engaĝiĝo kaj havas fierindan kaj daŭran historion de mondplibonigaj agadoj. Ĝiaj valoroj – interalie respekto de homaj rajtoj, internacia solidareco, homa emancipiĝo kaj transnacia edukado – profunde kongruas kun la Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE) difinitaj de UN, nomataj ankaŭ Agendo 2030.

Tra la mondo esperantistoj kaj esperantistaj organizaĵoj jam kontribuas al tiuj celoj per agadoj pri edukado, kulturo, socia inkluziveco, genra egaleco, respekto de la naturo, mediprotektado, internacia solidareco, packonstruado kaj aliaj kampoj, ofte kunligante lokan agadon tutmonden.

Daŭripova evoluigo ankaŭ en nia propra agado

La kongreso konstatas, ke la vojoj por atingi la Celojn por Daŭripova Evoluigo estas ankoraŭ tre longaj kaj ke ofte la decidantoj ignoras ilin, kvankam 2030 alproksimiĝas; eĉ kelkaj celoj malproksimiĝas anstataŭ progresi. La kongreso instigas ĉiujn esperantistojn kaj esperantistajn organizaĵojn ne nur subteni la CDE-ojn, sed ankaŭ pli vaste apliki iliajn principojn en la propra agado. Daŭripoveco ne rilatas nur al tio, *kion* ni faras, sed ankaŭ al tio, *kiel* ni laboras, organiziĝas kaj kunlaboras.

La kongreso aparte instigas la Esperanto-organizaĵojn evoluigi strukturitajn volontulajn programojn, kiuj ebligas al homoj engaĝiĝi, kunlabori translime, lerni kaj transdoni spertojn, aparte atentante la bonfarton, motiviĝon kaj daŭripovan engaĝiĝon de siaj volontuloj.

Esperanto en la internacia civitana socio

Volontulado estas integriga, memstara kaj nemalhavebla formo de civitana partopreno. Volontula kaj profesia agadoj havas malsamajn, sed reciproke kompletigajn rolojn kaj nek povas nek devas anstataŭi unu la alian.

La atingo de la CDE-oj postulas kunagadon inter forta civitana socio, entreprenoj kaj respondecaj publikaj institucioj je loka, landa kaj internacia niveloj. La kongreso instigas la Esperanto-movadon plene kaj aktive partopreni tiun civitanan kunlaboron kaj plifortigi siajn ligojn kun aliaj organizaĵoj kaj iniciatoj.

Lingva justeco kaj internacia kunlaboro

La kongreso atentigas, ke la lingva dimensio de la CDE-oj restas tro ofte subtaksata. Lingva justeco kaj egala internacia komunikado estas gravaj antaŭkondiĉoj por efika, paca kaj respekta internacia kunlaboro. Laŭ la kongreso gravas, ke ĉiuj registaroj respektu la lingvajn rajtojn de siaj malplimultoj kaj subtenu multlingvismon. La kongreso ankaŭ substrekas, ke lingva justeco ne limiĝas al la protekto de minoritataj lingvoj, sed etendiĝas ankaŭ al egaleca internacia komunikado inter ĉiuj popoloj.

Tial la kongreso reasertas la valoron de Esperanto kiel lingvo de egaleca kaj egaliga internacia komunikado, kiu faciligas kunlaboron trans lingvaj kaj kulturaj limoj kaj kontribuas al pli justa, inkluziva kaj daŭripova mondo, emfazante, ke Esperanto estas agnoskita de Aŭstrio kiel nemateria kultura heredaĵo kaj lingvo de kulturo. Esperanto povas doni ŝlosilan kontribuon al la atingo de la celoj de UN.

Alvoko

La kongreso bedaŭras la nunan tendencon al repolusigo de la mondo en influzonojn, kiuj favoras mensogojn, timigadon kaj solvon de malekvilibroj per forto kaj milito anstataŭ per dialogo kaj respekto al internacia juro.

La kongreso esprimas sian subtenon al la centra rolo de UN en la kunordigado de internacia kunlaboro por daŭripova evoluigo kaj instigas la membroŝtatojn provizi ĝin per la necesaj rimedoj, kompetentoj kaj politika subteno por efike plenumi tiun rolon.

La kongreso aparte alvokas atenton je la lingvaj aspektoj de la CDE-oj aparte rilate justan lingvouzon por kvalita edukado, reduktion de malegaleco kaj aliron al justico.

Fine, la kongreso alvokas ĉiujn esperantistojn konkretigi la inspiron de ĉi tiu kongreso en agoj kaj projektoj por la CDE-oj, pli ofte kaj pli konscie uzi Esperanton, ankaŭ novige, kiel laborlingvon de internacia civitana kunlaboro.

Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 1323 (2026-08-20)

Festivalo LUPA 2026



Slovenia Esperanta-Ligo ankaŭ ĉijare partoprenis en la festivalo de neregistaraj organizoj (NRO), nomata LUPA, kiu okazis ĵaŭdon, la 3-an de septembro en Ljubljano ekde la 10-a ĝis la 18-a horo. Por prezenti niajn agadojn ni ricevis duonan standon sur la meza ponto de la Tripontaro, rekte super la ondoj de la rivero Ljubljanica. Vizitis nin multaj preterpasantoj, ankaŭ fremdaj turistoj. Krome oni povis dum la festivalo ekkoni la buntan aron da agadoj ankaŭ de aliaj NRO-oj, ja prezentis sin ĉirkaŭ 120 organizoj. **O.K.**



LUPA 2026-Esperanto-teamo: Ostoĵ, Martica, Nika kaj Skribas (Foto: A.Ž.S.)

Virtuala kongreso de UEA 2026



La aliĝilo al la 7-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) de la 26-a ĝis la 29-a de novembro 2026 jam funkcias: <https://vk.esperanto.net/2026/aligxilo>. La aliĝo estas senpaga por individuaj membroj de UEA ĝis la 15-a de novembro. Eblas ankaŭ aliĝi al la VK sen aliĝi al UEA.

Aliĝu nun al la 7-a VK! Invitu ankaŭ aliajn kaj, se vi povas, subtenu la Kongreson. Interesatoj kontribui al la programo, inkluzive de la Virtuala Movada Foiro (ViMF), povas ĝis la 8-a de novembro trovi informojn kaj sendi proponojn ĉe: <https://vk.esperanto.net/2026/programo>.

Ĝis nun aliĝis 219 personoj el 52 landoj, unu aliĝinto estas sloveno. **O.K.**

Objave v medijih

V ljubljanskem **Delu** je Janez Zadavec 27. julija 2026 objavil v rubriki *Pisma bralcev* svoj prispevek ob svetovnem dnevu esperanta z naslovom *Dan esperanta: od prvega učbenika do prizadevanj za Unescov dan*. V arhivu ga najdete s to [povezavo](#). Žal ta članek kot tudi tisti od 13. julija 2026 z naslovom *Upanje ima dva otroka*, ni več prosto dosegljiv, spletna stran zahteva geslo oziroma plačljivo registracijo.

V **Primorskih novicah** je 31. julija 2026 Lučka Lešnik v rubriki *Kultura* objavila članek z naslovom *Izolan izdal knjigo v esperantu*. Članek spremlja slika Zorana Hudalesa, sicer pa poleg zgodbe o avtorju in novi izvirni esperantski knjigi pove še marsikaj o esperantu in dejavnosti slovenskih esperantistov. Poglejte si članek s to [povezavo](#).

V ljubljanskem **Delu** je 21. 9. 2026 Janez Zadavec objavil pismo bralcev z naslovom *Politično nepismeni odrasli, bralno nepismeni mladi*. V svojem razmišljanju ob mednarodnem dnevu miru in evropskem dnevu jezikov je opozoril na mednarodni jezik esperanto, ki lahko izboljša in politično pismenost in bralno pismenost, ki sta pri nas na zaskrbljujoče nizki ravni. Članek je dosegljiv v [arhivu časopisa](#).

Kion oni legos en la sekvonta numero?

Por la sekvonta numero de *Informacie / Informoj*, kiu aperos en januaro 2027, ni antaŭvidas raportojn pri la aranĝoj en Esperantujo ĝis la fino de decembro 2026, precipe pri la Zamenhof-Tago festoj. Krome el nia agado:

- nova esperantigo de Cankar
- aktualaj kursoj de Esperanto
- Eŭropa kongreso de Esperanto, majo 2027 en Provenco, Francujo
- katalogo de la arĥivo de SIEL ktp.

La redaktoro rekomendas sin por kontribuoj pri viaj agado, proponoj, komentarioj, fotoj kaj rimarkoj, kiuj povus interesi la legantaron. Aparte estas bonvenaj verkoj en Esperanto, ĉar ni ĉiuj bezonas ekzerciĝon kiel aŭtoroj kaj legantoj. **O.K.**

Pa še to....

Kaj ankaŭ tion ĉi...

Monda Pupekspozicio



Nedavno je Janez Jug prejel zanimivo darilo iz Japonske – 10 izvodov knjige *Monda Pupekspozicio*, ki jo je napisal in pri založbi Tenseiŝa maja letos izdal Etsuo Miyoshi. Knjiga formata A5 ima 192 strani in mehko vezavo. Podnaslov *Rajdante la venton de Esperanto* mnogo pove o vsebini. Namreč poleg predstavitve zbirke 1.620 lutk iz 70 držav sveta pripoveduje tudi zelo osebno zgodbo avtorja, ki je z esperantom navezal stike z mnogimi osebnostmi kulturnega in političnega življenja. To posebno knjigo si seveda lahko izposodite v naši knjižnici ali pa pridobite svoj izvod s prošnjo na info@esperanto.si.

INFORMACIJE / INFORMOJ izdaja / **eldonas** Združenje za esperanto Slovenije / **Slovenia Esperanto-Ligo**, Grablovičeva 28, SI-1000 Ljubljana, Slovenija / **Slovenujo**.
<http://www.esperanto.si>. Matična št. / **kodnumero** 1205226. ID za DDV / **n-ro por AVI**: 93737777.
Poslovni račun / **bankkonto**: IBAN SI56 6100 0001 2538 761 pri / **ĉe** Delavska hranilnica d. d..
(Swift-**kodo**: HDELSI22). Uredil / **redaktis** Ostoĵ Kristan, lektoriral / **kontrollegis** Tomaĵ Longyka.
ISSN 2385-9628 URL: <http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacie-informoj-0>